ĝia aĝo estas ĉirkaŭ 11 000 jaroj, kaj evidentiĝas, ke la takso, kiun faris antaŭ multe da jaroj profesoro de Geer per la varva metodo, estas proksimume ĝusta. Sed lastatempe profesoro Flint el la *Yale*-universitato prezentis por esplorado per la radio-karbona metodo kelkajn specimenojn el Norda Ameriko, kaj per tio oni konstatis, ke la tiel nomita *Mankato*-stadio de la glacia tavolo en Norda Ameriko estis samtempa kun la Fennoskandia epoko en Eŭropo. Ligno el arboj detruitaj de la glacio de Mankato indikas, ke tio okazis antaŭ ĉirkaŭ 11 000 jaroj. Ĉi tia rezulto estas multe pli grava ol eble estas unuavide evidenta. Ni jam scias multon pri la prahomo de tiu epoko en Eŭropo, kaj ju pli granda estos la nombro de tiaj kunrilatiĝoj konstatitaj pere de la radio-karbono, des pli kompleta fariĝos la bildo pri la unuaj stadioj de la *teknologia* kaj kultura evoluo de niaj prapatroj tute tra la mondo.

Kvankam la moderna homo tro emas malatenti la spertojn de la pasinteco, kaj kelkfoje eĉ fieras pro tio, ke li ilin malatentas, mi konvinkiĝis, ke estas neeble kompreni la homaron, se oni ne scias, kiel la homo fariĝis tio, kio li nuntempe estas. Kaj por tia kompreno absolutaj kronologioj de la prahistoriaj epokoj tiaj, kiajn jam provizas al ni la radio-karbonaj metodoj, estas nepre necesaj.

E : 4 : 41

4 : 408.9

LINGVISTIKO, INTERLINGVISTIKO KAJ INTERNACIA LINGVO

de Delfi DALMAU (Barcelono).

En la lingvistika kaj interlingvistika kampoj, mi dankas Manders kaj ĉiujn esplorintojn pri lingvoj kaj interlingvoj. Mi memoras ke mi multe ĝuis legante siatempe esperantajn pristudojn de de Saussure kaj Stojan, kiel nun de Manders. La kleraj katalunaj modernaj gramatikistoj unue Fabra kaj poste Sanchis Guarner havigis al mi lumigajn plezurojn kaj plezurajn lumigojn. Same povas mi diri rilate al Benot pri kastila lingvo, Jespersen pri angla kaj ambaŭ pri ĝenerala profunda gramatiko. Mi ne citu multajn aliajn, kiuj utilis aŭ plaĉis al mi, pri diversaj lingvoj, sed ne tiel profunde min impresis. Nu, en la kampo de la simpla esprimado, de la lingvuzado, de la homa interrilatado, mi ĉion ŝuldas al la grandaj *kreintoj* de mia lingvo kaj de la aliaj kiujn mi lernis, per kiuj mi povis legi ne nur la respektivajn literaturajojn, sed ankaŭ la respektivajn pristudojn. Tiel sen Esperanto, sen Zamenhof, mi ne povus danki al niaj de Saussure, Stojan kaj Manders, mi ne povus ĝui Esperantujon kun tiom da verkistoj, kun tiom da gesamideanoj en ĉiuj landoj.

Oni povas senfine paroli pri detaloj: ĉu pli bone *nacio* aŭ *naciono*, finaĵo por pluralo per *j*, *s*, aŭ *n*? Inter la angla *nation* elparolata per du simplaj silaboj ĉiu kun unu simpla vokalsono kaj akcento sur *a*, kaj la itala *nazione* kun kvar vokalsonoj kaj akcento sur *o*, estas multaj vidpunktoj, preferoj, opiniebloj; tiom, ke neniam finiĝus la diskutado. Por universala lingvo, planlingvo, interlingvo, mil, centmil tiaj detaloj estas diskuteblaj; kaj fine ĉiuj devus lingve harmonii inter si, aŭ pristudo rekomenciĝi. Kaj certe oni devus rekomenci senfine. Feliĉe, Zamenhof, estis pli ol genia lingvisto aŭ interlingvisto: genia lingvulo inter Okcidento kaj Oriento; tial li kreis lingvon por internacio, kiel ĉiuj Dante kaj Cervantes konscie-nekonscie faris por nacio.

Nur dank' al sinteziga genieco, kaj mirakla momento por naskiĝo de lingvo, de solvo sopirita de homaro dum jarcentoj, dum jarmiloj, Zamenhof povis krei Esperanton. Senfinaj estis la problemoj, eĉ post vido, decido aŭ intuicio, ke internacia lingvo devas esti *natura* lingvo; kiel, ekz., diri internacie la katalunan *portar*, kastilan *llevar*, francan *porter*, italan *portare*, portugalan *levar*, anglan *carry*, germanan *tragen* inter tiom da aliaj naciaj diferencoj? Ĉu *tragi*, *kari*, *porti*, ...? *Porti* estas ne akceptebla, ĉar la radiko *port* estas internacia kun senco: libera spaco aranĝita en muro: angla vortaro diras: *porter:* door-keeper, gate-keeper; en germana vi trovas *portal*, *portier*, *portiere;* en kataluna, portugala kaj itala, pordo estas *porta;* en hispana, pordisto estas *portero*. Krome, *port* estas ankaŭ internacia por ŝiprifuĝejo: en angla *port*, franca *port*, itala *porto*, portugala *pôrto*, hispana *puerto*, kataluna *port;* do internacia *portisto*, ekzemple, signifus laboristo por ŝiprifuĝejo, kaj por enirejo-elirejo ĉe muro, domo, palaco. Neeble do akcepti la radikon *port-* por senco subteni pezan objekton. Aliflanke, la angla *carry*, la hispana *carro* kaj eĉ la kataluna *carrer*, havigas radikon *kar-* por tiu signifo. Tamen, Zamenhof solvis plej trafe per *porti*, *pordo* kaj *haveno*. Efektive, plej internaciaj *import*, *eksport;* eblis palatumi *t* al *d* por *pordo* kaj alpreni la anglan-saksan *haven* el la landoj kie estas plej grandaj kaj multaj havenoj el kiuj ŝipoj iras al plej diversaj landoj. Tiel la Majstro solvis kiel genia lingvulo, milojn da problemoj kiujn lingvistoj kaj lingvistikistoj interdiskutus senfine, pri antikvaj vortoj. Kaj pri modernaj? Ne ĉiuj modernaj estas tiel simplaj kiel *fonografo* aŭ *kafo*. Estas la internaciaj *cigar* kaj *cigarette;* sed *cigareto* estus malgranda *cigaro*. Do kiel diri *cigarette* kiu signifas alian aferon? Tre facile estas post solvo kiel *portisto* kaj *pordisto*, *cigareto* kaj *cigaredo!*

Jes, tre facile kiam iu trafis la solvon. Tre simple, sed neniu elpensis ĝin antaŭe!

Post la homara, la universala genia solvo de Zamenhof, en Esperanto kiel en ĉiuj naturaj lingvoj aperados pli-malpli gravaj solvendajoj. Post la fundamenta solvo kaj solva fundamento de la Majstro, lingvistoj, lingvistikistoj kaj interlingvistikistoj multe devos diskuti pri relative flankaj problemoj. Ni memoru kiel ortografie moderniĝis kelkaj lingvoj: rusa, turka, portugala, kataluna; kiel priokupiĝas anglalingvaj eminentuloj pri tiu afero.

En angla lingvo ne nur estas iuj paroj aŭ paraleloj kiel *tongue* kaj *lan-*

guage, sed preskaŭ duobla lingvo: saksa-angla kaj latina-angla. Facile estas klarigi ke *tongue* estas *lango* kaj *language lingvo;* plej moderna angla vortaro, post senco de lango aldonas kiel sencojn de *tongue: power of speech, manner of speaking, speech, language;* do *tongue* signifas ankaŭ lingvon. Estas libroj kiuj montras ke paĝoj da teksto povas esti esprimataj tute en lingvo de *tongue* aŭ tute en lingvo de *language*. Tamen la angla funkcias evidente kiel nacia kaj kiel internacia lingvo.

Alia nacia kaj internacia lingvo estas la kastila. Tamen en ĝi konkuras aŭ rivalas por restoracio la formoj: *restaurán, restaurant, restaurante, restorán;* por fadenfabriko: *filatura, hilatura, hilandería;* por piedpilko: *foot-ball, futbol, fútbol, balompié*. Se iu konsultas en hispana vortaro uzon de plej oftaj prepozicioj, tiu falas en labirinton.

Cetere en ĉiuj naturaj kulturlingvoj okazas simile. Kaj tamen ĉiuj progresas, difiniĝas, preciziĝas!

Esperanto estas natura lingvo kaj evoluas idente al ĉiuj naturaj, sed fundamente de internacia hindoeŭropa bazo, anstataŭ nur nacia; kaj el kerno de fundamentaj simplaj gramatiko kaj vortaro.

Zamenhof mem antaŭvidis tian evoluon kaj malfermis al ĝi ĉiujn pordojn. Li ĝojus vidi hodiaŭ plenan gramatikon kaj plenan vortaron, kaj konstati jam klasikan kaj modernan lingvaĵon.

Ni ĝoju ke estas jam lingvistikistoj kaj interlingvistikistoj en Esperantujo; sed ni pli profunde ĝoju ke estis en nia mondo Zamenhof, kaj dank' al li kreiĝis Esperantujo laŭ lingvo kaj laŭ sento internaciaj.

Ne estas katastrofo ke diversaj formoj rivalas por esprimi saman sencon, ĉu en nacia, ĉu en internacia lingvo. Sed ni devas elekti el plej bonaj verkistoj kaj oratoroj, por triumfigi la plej bonan. Gramatikistoj kaj vortaristoj devas aposteriore konfirmi nian pli ĝeneralan elekton.

57/59 : 001.4 = 089.2

NOTOJ PRI KELKAJ SUFIKSOJ SISTEMATIKAJ KAJ PRISKRIBAJ EN BIONTOLOGIO

de C. STØP—BOWITZ (Norvegujo).

En *Scienca Revuo* [1951] 3 28 A. Albault publikigis artikolon sub la supra titolo. Estante zoologo mi de jaroj okupis min pri ellaborado de zoologia terminaro Esperanta kaj prilaboris la zoologiajn vortojn de la venonta eldono de Plena Vortaro. Mi tial permesas al mi esprimi kelkajn opiniojn pri la proponoj de s-ro Albault.

Proponante novan sufikson, ĉu ĝeneralan, ĉu fakan, oni devas atenti:

1e. La principojn, laŭ kiuj d-ro Zamenhof formis la Esperantajn sufiksojn;

2e. La internaciecon de la proponata sufikso;

3e. La neceson de aŭ bezonon pri la proponata sufikso.

Studante la Zamenhofajn sufiksojn, ni konstatas ke ili ĉiuj estas unusilabaj

(por ne trolongigi kunmetitajn vortojn), ili komenciĝas per vokalo (por povi sekvi post kiu ajn litero), ili finiĝas per konsonanto (ĉar post ili sekvos ĉiam vokala finaĵo). Tiujn principojn oni do *laŭeble* sekvu ankaŭ rilate al novaj fakaj sufiksoj, se ne alta grado de internacieco postulos kaj permesos ion alian. Sed oni zorge atentu ne enkonduki sufiksojn por tre limigitaj ideoj, malofte aperantaj, nek tiajn kun tro parencaj signifoj.

Kaj nun mi transiras al la proponoj de s-ro Albault.

I. Sistematikaj sufiksoj.

1. *Sufiksoj por familioj kaj subfamilioj en zoologio.* En la 19a jarcento ne estis fiksitaj sistematikaj sufiksoj zoologiaj, kaj diversaj aŭtoroj uzis diversajn formojn. Precipe oni vidis por familioj *-oidea* kaj *-ea*, por subfamilioj kelkfoje *-oinea*. Jen sendube la origino de la Esperantaj formoj *-oid'* kaj *-oin'*. Sed kiam oni ĉirkaŭ la komenco de la nuna jarcento fiksis la „Internacian Regularon de Zoologia Nomenklaturo", oni fiksis por familioj la sufikson *-idae* kaj por subfamilioj *-inae*. En tiuj sufiksoj la *-ae* estas nur plurala finaĵo. Oni ne uzas latinan singularon de ili. Sed el nacilingvoj ne nur la franca uzas ilin singulare: ankaŭ la angla, germana kaj skandinaviaj lingvoj tion faras, kaj ĉiam kun akcento sur *i*, kaj kun aŭ sen senakcenta finaĵo *-e*.

Efektive *-oid'* internacie jam havas pli vastan signifon (= simila al). *-ide'* kaj *-ine'* estas „francismoj" ne internaciaj (francoj ofte uzas ankaŭ sufikson *-iens* por familioj), ili estas dusilabaj kaj finiĝantaj per vokalo. Ankaŭ *-ida'* kaj *-ina'* ne taŭgas, parte pro la samaj kaŭzoj, parte ĉar, precipe en paleozoologio, oni ofte uzas **-ida** por alia sistematika rango.

Jam antaŭ kelkaj jaroj mi proponis la formojn *-ed'* kaj *en'* por *-idae* kaj *inae*. Ekz.: *Cervedoj (Cervidae), Cervenoj (Cervinae)*. Tiuj formoj trovis vastan aprobon flanke de esperantistaj zoologoj, kun kiuj mi korespondadis, kaj mi uzas ilin en la venonta eldono de Plena Vortaro, kun la aprobo de prof. Waringhien.

2. *Sufikso -e'*. a) Dum mia laborado pri zoologia terminaro Esperanta mi neniam renkontis malfacilaĵon pro tio ke *-ul'* povas signifi jen homon, jen beston. La propono ŝajnas superflua francismo, kaj cetere unulitera sufikso estas malfacile rekonebla.

b) En zoologia sistematiko oni klopodis enkonduki specialajn sufiksojn por ordoj kaj subordoj, kaj ankaŭ por aliaj sistematikaj kategorioj, sed ĝis nun interkonsento ne estas atingita. En ornitologio oni nun ĝenerale uzas *-formes* por ordoj, parte ankaŭ en ihtiologio. (En P. V. mi uzas -formaj birdoj, fiŝoj). Ŝajnas al mi saĝe atendi pri fiksado de Esperantaj sufiksoj, ĝis interkonsento inter la sciencistoj estos atingita. Sufikso *-e'* por striktigi priskriban nomon al sistematika signifo *ĝenerale*, povus naski nur konfuzon, kaj apenaŭ estus praktikebla por laiko.

3. En botaniko *-ac' (-aceae)* por familioj kaj *-oid' (oidea)* por subfamilioj estas ĝenerale akceptitaj.